# ĜENERALA INFORMILO

N-ro 141 januaro 2007

BARCELONA ESPERANTO-CENTRO
Bassegoda, 40, 3°, 1ª
ES-08028 BARCELONA, Hispanio, Eŭropa Unio
Telefono 93 333 80 81, barcelonaesperantocentro@yahoo.es

A T O M O
Junulara Sekcio de B E-C

## ATENTON

BEC-estraro informas ĉiujn membrojn, gekunlaborantojn kaj Esperanto-asociojn, ke ekde nun ili bonvolu NE sendu siajn informilojn, bultenojn kaj revuojn en la keston "Ap. 23484 ". Ni rekomendas sendi la materialojn je la adreso: Barcelona Esperanto-Centro, Rector Triadó, 53, ES-08014 Barcelona, Hispanio. Kompreneble por la korespondado vi devas uzi la adreson: BEC Bassegoda 40.3°, 1°, Barcelono aŭ barcelonaesperantocentro@yahoo.es
Antaŭdankon. por via helpo.

---

## 6-AJ SOMERAJ DIALOGOJ , ESPERANTO-RESTADEJO 8 - 9 SEPTEMBRO

En Monistrol de Montserrat,Barcelono. Sidejo kaj Koresponda adreso: BE-C Salvador Aragaj, Cami del Pou n-ro 9, ES-08691, Monistrol de Montserrat, Hispanio, Eŭropa Unio. Tel. 64 54 04 755. Informojn: Retadreso: barcelonaesperantocentro@yahoo.es
Programo. la tagon 8an , 11 h. Saluto kaj bonveno. Prelego kaj dialogoj, Esperanto-leciono; babilado,Ronda diskutado. Matenmanĝo, tagmanĝo kaj vespermanĝo en "Hostal Guilleumes" apud la Restadejo. Dulitaj ĉambroj en la sama "Hostal".

---

## ĜENERALA KUNVENO DE BARCELONA ESPERANTO-CENTRO

LA TAGON 20-an DE FEBRUARO JE LA 19,30 HORO
EN NIA SIDEJO EN " CENTRE CIVIC CONVENT DE SANT AGUSTÌ"
Strato Comerç 36, 08003 Barcelono.

**BEC-estraro atentigas siajn membrojn, kaj kunlaborantojn , ke ĉijare BEC aĝos 30 jarojn kaj verdire la BEC-estraro dezirus festi adekvate la datrevenon**. Pro tio ni petas de ĉiuj respondeculoj, estraranoj, membroj kaj kunlaborantoj : proponojn, helpojn kaj kunlaborojn kun la celo ke nia asocio unue firmigos nian pozicion ene de la urba,nacia kaj internacia Esperanto-Agado kaj due ,ke ĉiuj geesperantistoj de Barcelono kaj de la barcelona provinco ĝuos kun ni la jaron 2007. Antaŭdankon por via subteno.

TAGORDO

1a. Legado kaj aprobo de la sekretaria raporto: Esperanto-Kursoj.Ĝenerala Informilo, Informado al neesperantistaj asocioj kaj personoj. Kunlaborado kun aliaj E-asocioj 2006 ktp ktp.
2a. Financa raporto 2006.
3a. 30a DATREVENO DE LA FONDO DE BEC. Projektoj,Novaj celoj kaj aliaj vojoj por lernigi la Internacian lingvon ESPERANTO.
4a. Ĝenerala laborplano:Sendi reprezentantojn al la : 92-a UK de E en Jokohamo, Japanio.
66-a Hispana Kongreso de Esperanto en Palos de la Frontera, Huelva.
15-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Tossa de Mar, Hispanio
6-aj Someraj Dialogoj en Monistrol de Montserrat, Barcelono.
59-a Kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto Federacio en Parizo. Francio
7-a FIRENTITATS dies 4, 5 i 6 de maig.Lloc: Parc i carrer de l'Espanya Industrial.
5a Proponojn, petojn kaj demandojn. Fermo de la Ĝenerala Kunveno.

---

## 8 de febrer EXPOSICIÓ DE POSTALS, INSÍGNIES I CARTELLS EN ESPERANTO

**L' ESPERANTO DE LA BARCELONA ANTIGA DE FERRAN RIPOLL**

**Centre Cívic Guinardó,** Av. Mare de Déu de Montserrat, 136-140 i Ronda Guinardó 101
**Inauguració: 8 de febrer.** Xerrada de Martí Guerrero sobre el tema **" L' ANGLÈS i L' ESPERANTO"** a les 20.00 h.. Finalitzat al acte, tindrà lloc una degustació.
Col-laboran en l'exposició: Barcelona Esperanto-Centro i Associaciò Catalana Ferroviària d' Esperanto. Bus: 31, 32, 39, 55, 74. Metro: Guinardó (L4).

## DICCIONARI CATALÀ – ESPERANTO
### Malgranda recenzo pri granda verko

Kiam oni prezentis ĉi tiun vortaron al la E-klaso en Casinet d'Hostafrancs, ĝi kaŭzis tre agrablan surprizon al ĉiuj membroj. Mi pripensis ke la vortaro estis kaj estas granda trafo, ĉar ne ofte vidas novajn vortarojn en "Català-Esperanto". Tio estas mirinda . Laŭ mia scio la unika vortaro estis eldonita la jaron 1909 fare de F. Pujula y Valles kaj la verko enhavas 7.000 vortojn, feliĉe la nuna vortaro enhavas multe pli ol 20.000 vortojn.

Estas klare, ke iliaj aŭtoroj ne intencis havi ĉefrolon, kiel ofte okazas en miaj medioj, multaj personoj faras tre bonan taskon senprofita celo. Tamen en aliaj medioj ne okazas same. Mi faras ĉi tiun klarigon ĉar ni devos atingi la trian folion por trovi la nomojn de la aŭtoroj Luis Serrano Pérez kaj Santiago Torné i Grau kaj la reviziantojn: Martí Guerrero, Giordano Moya, Guillem Nicolas kaj Ernest Roca, ĉiuj tre konataj en la Esperanto-agado en Katalunio. Apud estis indikita la oficialaj datoj de la verko eldonita de Barcelona Esperanto-Centro.

Tre interesa estas la listo de la konsultitaj verkoj en Esperanto kaj Kataluna lingvoj, tio montras al ni la enorman laboron de niaj samideanoj, kiuj plenumis sukcese sian laboron. Ankaŭ ni trovas la paĝojn "Aclariments" klarigoj kaj "abreviatures" mallongigoj, kiuj tre bone helpos al la studentoj.

Finfine ni pritraktas la ĉefan celon, la tabeloj de la vortoj. Ekde la A ĝis la Z la aŭtoroj helpas nin en la tradukado de nia kataluna lingvo al la internacia lingvo Esperanto. Ne nur la simplaj kaj ordinaraj vortoj, ankaŭ vortoj malpli uzataj eĉ strangaj, ne forgesante la kunmetitajn vortojn, konklude tre bona tasko estis farita. Nenio restas hazarde, firmigas ĉe mi tiun ideon la lasta tabelo pri personaj kaj geografiaj propraj nomoj, tre ampleksa kaj interesa. Nur estas eta makulo. En la nomoj de la landoj ankoraŭ estas indikita la uzado de la sufikso "uj".Ekzemple; Hispan-io,-ujo. Nuntempe nur oni uzas la sufikson "io".

Fine, miajn gratulojn por ĉiuj respondeculoj: Aŭtoroj, reviziantoj kaj eldonantoj.Danke al ili, ĉiuj ni povos ĝui tre necesan vortaron por nia Esperanto-movado. Sanon al ĉiuj kaj dankon por via pacienco.

Pako Crespo

---

**FAMILIA STUDSEMAJNO EN SUDA FRANCIO 24 FEBRUARO – 3 MARTO 2007**
Dum ankoraŭ frostas en ia regiono, venu al la mediteranea maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj. Vin atendas amika, familia etoso. Dum vi lernos matene en tri nivelaj kursoj, iu prizorgos viajn infanojn. Posttagmeze, vi mem aranĝos vian programon; studado, promenado, familia vivo ĝis la vespero, kiam estas animado. La studejo estas konforta hotelo"Le Renouveau" en Agay (ĉe Saint-Raphael). Restado kaj manĝoj por la tuta semajno : 280 € (por infanoj sub 14 jaroj : 140 €). Aliĝoj al la kurso: 55 €, (familia aliĝo; 100 €). Informoj kaj aliĝoj: Monique Prezioso, 92 impasse Jean Moulin, FR- 83700 Saint-Raphael, prezmoni@hotmail.com
Tel. (33) 494 83 06 88 .

---

**15a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO**
**TOSSA DE MAR , HISPANIO, EŬROPA UNIO, 29 SEPTEMBRO 6 OKTOBRO**
**"Sub aŭspicioj de Hispana Esperanto-Muzeo"**
Koresponda adreso: Luis Serrano Pérez. Apartat 423. ES-08200 Sabadell ,Hispanio
Tel. (+34) 93 727 50 21. Retadreso: luis_serrano@mixmail.com
http://personales.ya.com/semajno

La Organiza Komisiono post la kontaktoj kun la urbestrino de Tossa de Mar Pilar Mundet kaj la turisma oficejo, informas vin ke jam estas preparita la Oficiala Afiŝo kaj Unua Bulteno de IE-S kaj poŝkalendareto 2007. Meze de januaro oni ekdisdonis la menciitajn eldonaĵojn.

O K

---

# 14-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO
## LA PINEDA , TARRAGONO , HISPANIO

29.9. - 1.10. 2006

Estis vera plezuro ĝui ĉi-jaran 14-an Semajnon de la kulturo kaj turismo en Katalunio. Ĝi okazis la lastan semajnon de septembro en la Pineda, kiu situas inter la urboj Tarragona kaj Salou. Ni restadis en la hotelo "Carabela". Multaj el ni profitis ĉiutagan sunumadon ĉe apuda strando kaj naĝadon en la Mediteranea maro. Al la evento aliĝis 109 personoj el diversaj landoj. La plej malproksimaj venis el Koreio, Meksikio, Litovio, Islando, kaj Svedio. Inter la hispanoj aperis kelkaj novuloj el Andaluzio. Tamen la plej multaj partoprenantoj venis el Francio. La solenan inaŭguron ĉeestis reprezentanto de la urba turisma oficejo kaj la urbestro de Vila-Seca. Li sincere bonvenigis nin dezirante sukceson al la evento. La Semajno estis bone organizita. La triopo, s-roj Serrano, Aragaj kaj Torné zorgis, ke nenio manku al ni. Ni bone kaj bonguste manĝis trifoje tage. Estis riĉa elekto de diversaj manĝaĵoj. Por kvaropo ni ricevadis tagmeze kaj vespere botelon da ruĝa vino.

La programo inkluzivis E-kurson por jam spertaj esperantistoj. Sukceson havis ankaŭ lernado de Esperanto per kantado, kiun lerte gvidis s-ino Josée Lafosse. Ni ricevis kantlibretojn kiujn ni utiligis ankaŭ dum la busveturado al diversaj ekskurslokoj. La unua duontaga ekskurso gvidis nin al la mezepoka urbo Montblanc. Ĝi estas ĉirkaŭita per altaj kaj dikaj muroj tre bone konservitaj. Dum la tuttaga ekskurso ni veturis al la urbo Lleida kie ni trarigardis kastelon. Iuj supreniris turon kun 260 ŝtupoj. Interesa estis vizito de la urbodoma muzeo kie troviĝas multaj arkeologiaĵoj. Poste ni vizitis oleofabrikon en Borges Blanques. Tie ni konatiĝis kun la procedo de oleoproduktado. Survoje al la fabriko ni vidis multajn olivarbojn. En ĝia korto troviĝas eĉ kelkaj plurcentjaraj olivarboj. Por ŝanĝi la guston ni revenvoje haltis en biskvitfabriko "Rifacli". Tie ni estis regalitaj per plurspecaj biskvitoj kaj vino. Dum la dua duontaga ekskurso ni haltis en Tarragona por rigardi homturan monumenton kaj poste ni daŭrigis al la vinkelo en Freixenet. Tie ni spektis filmon kiu montris la tutan proceđon de la ŝaŭmvinfabrikado. Sekvis vizito de la keloj, kie estas amasigitaj miloj da boteloj. Ĉe la fino ne mankis gustumado de bongusta ŝaŭmvino.

La semajna programo estis riĉa je prelegoj. S-ro Husejn Al Amily el Anglio, kiu naskiĝis en Irako, loĝis en Libano kaj poste en Germanio kaj Francio rakontis kaj klopodis klarigi al ni la nuntempan situacion en mezoriento. Pere de liaj lumbildoj ni vizitis Irakon. Alia interesa temo estis pri orientaj landoj: Ĉinio, Japanio, Koreio, kiun prezentis al ni s-ro Choi Man-Won el Koreio. Krom aliaj faktoj ni eksciis pri malsamaj manĝmanieroj en tiuj landoj. Pri la konata germana artisto Josef Boys ni eksciis danke al s-ro Wolfgang Gunther. Alia prelego de la sama preleganto temis pri ekologio. S-ro Serrano gvidis debaton pri "Kial ankoraŭ ne triumfis Esperanto?" Esperanto-kurson gvidis s-ro Aragaj kaj la partoprenantoj ricevis ĉe la fino diplomon. Ni ĉiuj bone amikiĝis kaj amuziĝis ĝuante la Semajnon. Alia ĝojo venis de la franca teatra trupo "ĜO-JO", kiu prezentis kelkajn skeĉojn kaj ridigis nin.

Jam la trian fojon oni aljuĝis la premion Ada Sikorska pro meritplena poresperanta laboro. Ĉi-foje ĝin ricevis la 97-jara samideano Leo Lentaigne el Francio.

Du interkonaj vesperoj ebligis interparoli kun novaj kaj malnovaj geamikoj ĉe glaso da ŝaŭmvino. Neforgesebla estis vespero kun la folklora grupo "Montjuic", kiu kantis por ni "Habaneras". Kuraĝuloj kun plezuro dancis en la ritmo de muziko el Kubo. Dume la hotelkuiristoj pretigis tre bongustan "cremat" - bruligita kaj spicita rumo. Ĝin ni trinkis en specialaj tasetoj, kiujn ni ricevis donace. Kun belaj rememoroj ni revenis hejmen.

Liba Gabalda

# Esperanto vivas*

## Salvador Aragay, un dels difusors de l'idioma a Catalunya, dóna classes al Casinet ■ Mestre i alumnes en destaquen la "simplicitat

JORDI ORTET · HOSTAFRANCS

Ludwik Zamenhof, il·lustre oftalmòleg polonès de finals del segle XIX, tindria una petita alegria si la tarda dels dimecres pogués donar-se un volt pel Casinet d'Hostafrancs. El doctor va morir prou aviat (1917) com per estalviar-se moltes desil·lusions amb la sort del seu ambiciós invent –cridat a revolucionar la comunicació entre els homes– però potser s'emocionaria en comprovar que, gairebé un segle després, existeixen grups de persones que durant una hora a la setmana s'expressen únicament en esperanto.

**"Bonan Vesperon"**. La salutació de Salvador Aragay cap als seus alumnes ressona fins a deu vegades entre les parets de l'aula. El president i fundador de l'Associació Barcelona-Esperanto dirigeix les classes amb la seguretat de qui, malgrat ser delineant de professió, ha consagrat part de la seva vida a una llengua **"molt fàcil d'aprendre"**. Les regles bàsiques (l'Esperanto en té 16) així semblen testificar-ho: totes les paraules són planes, cada consonant té només un so possible i cada forma gramatical té una terminació fixa (els substantius en 'o', els adjectius en 'a', i els verbs en infinitiu en 'i', per exemple). **"En dos anys es pot aconseguir dominar-lo sense dificultats, molt més fàcilment que no pas el francès o l'anglès"**, assegura convençut Aragay, que recorda amb orgull que Espanya va ser el primer país a oficialitzar-lo i que Barcelona en va acollir el Congrés Universal, l'any 1909.

Si l'anglès ocupa el regnat dins de les llengües al planeta, en detriment del mateix esperanto, és **"perquè té diversos estats darrere que li donen suport"**, opina Aragay, que es resisteix a qualificar de **"fracàs total"** la situació actual de la llengua: **"Potser hem quedat una mica tancats dins el nostre cercle i no ens hem donat a conèixer prou"**. La comunitat esperantista –així se la denomina, tot i que ells mateixos recalquen que no tenen darrere cap secta, ni cap organització política ni religiosa– organitza anualment diverses trobades internacionals, la propera de les quals se celebrarà a Tossa de Mar, el setembre de 2007. Aquestes són les ocasions idònies per practicar amb d'altres parlants, un dels principals obstacles.

**"L'esperanto iguala tots els parlants i no tens cap desavantatge, perquè no existeixen nadius de l'idioma"**, argumenta Juanjo Crespo, un dels estudiants de les classes del mestre Aragay. Serà qüestió d'animar-se...

*(Esperanto vivas: L'Esperanto viu)




VELLA ESCOLA · El mètode seguit al Casinet per aprendre esperanto és clàssic, però efectiu. (Foto:

### ■ Petit vocabulari d'urgència

| Esperanto | Català |
|---|---|
| SALUTON | Hola |
| ADIAŬ | Adéu |
| DANKON | Gràcies |
| BONVOLU | Si us plau |
| MONDO | Món |
| HOMO | Home |
| VIRINO | Dona |
| VIVO | Vida |
| AMORO | Amor |
| LUNO | Lluna |
| MANĜAĴO | Menjar |
| KRISTNASKO | Nadal |
| JES | Si |
| NE | No |
| KIEL VI NOMIĜAS? | Com et dius? |
| MITINGO | Reunió |